



Jarkolekto : 2014

Numero : 2

Paĝo : 1

La Voĉo de Amikejo

Informilo pri *Senlime* kaj Esperanto en Eŭregiono Mozo-Rejno

Sendita al :

*Senlime*Esperanto-Asocio en Eŭregiono Mozo-Rejno
Avec le soutien de la Communauté française**En cas de non-distribution, renvoyer à**H. Lentzen
Feldweg 20
BE-4701 KETTENIS
Tel. xx-32-(0)87-55.43.26
E-mail : lentzen@senlime.org**Editeur responsable****Responsa eldonanto +****Informoj en la franca lingvo:**

Tel. +32-(0)87/33.02.92

GSM +32-486-947.957

Mail: jacques@senlime.orgEsperantista Grupo de Verviers
J.-M. Jacques, 5 rue J. Wauters
BE-4800 VERVIERS**Informatie in het Nederlands****Informoj en la nederlanda:**

Tel. xx-31-(0)43-455.14.36

Mail: parren@senlime.orgP.H.H. Parren, Heimansstr. 16
NL-6285 AM EPEN**Informationen auf deutsch****Informoj en la germana:**

Tel. xx-49-2406-7809

Mail: hogen@senlime.orgK. Hogen, Auf der Pief 22
DE-52134 HERZOGENRATH**Aperas kvarfoje en jaro kaj
rete elŝuteblas ĉe
www.senlime.org****Prezroj por BE, NL kaj DE :
Unuopa n-ro : 4 EUR
Jara abono : 12 EUR**Bonvolu pagi, prefere antaŭ la
jarfino, **NUR** al la konto :IBAN : **BE41 9795 3271 4810**

BIC : ARSPBE22

(banque : Argenta)

de *Senlime*, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.La jara kotizo al *Senlime* (10 €)
estas disigita de la abono al la
papera versio de nia informilo (12€).**ENHAVO :****p. 1 : Enkonduke...****p. 2 : Niaj programeroj lupee****p. 3 : Eŭregiona kalendaro 2013-2014 (2/2)****p. 4 : Novaĵoj pri Amikejo kaj EMRo****p. 5 : La Zagreba metodo (*Gerda malaperis*)****p. 6 : Verviersa angulo: Cours et U.K.****Kursoj kaj Universala Kongreso**

La nordfranca urbo Lillo gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto (en «Lille Granda Palaco» - kvartalo Euralille, nur kelkajn minutojn piede for de la urbocentra stacidomo) de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto 2015. Ĝi estos la 100-a Universala Kongreso, pro kio okazos tuttaga ekskurso en Bulonjo-ĉe-maro, urbo kie en 1905 okazis la 1-a Kongreso de Esperanto, invite kaj ĉeeste de Ludoviko **Zamenhof** mem.

La loko, el Verviers aŭ Kelmis, estas facile alirebla per trajno aŭ aŭtomobilo (235 km, 3 horoj), kaj survoje estos nek limaj nek lingvaj baroj! Jen do ununura okazo por praktiki kaj perfektigi siajn esperanto-konojn kaj renkonti verŝajne milojn da esperantistoj el la tuta mondo. Dum Universala Kongreso ĉiujare okazas plej interesaj eventoj (kompreneble en esperanto): solena malfermo (ĉiam emociiga), bankedo, balo, prelegoj, fakaj kunvenoj, kursoj (pri esperanto por komencantoj kaj progresantoj, sed ankaŭ per esperanto pri diversaj fakoj), teatro, kino, koncertoj, vizitoj, k.t.p.

Jam ekzistas inform-retejo pri Lilla kongreso 2015 :

<http://www.lve-esperanto.org/lille2015/eo/index.htm>

Pro tio, la grupo de Verviers okazigos novajn kursojn dum la lerneja jaro 2014-2015 (interalie 1 kunlabore kun **Eneo**-Verviers), kun la celo fine ebligi (ne devigi!) partoprenon de kelkaj lernintoj en la U.K. (ankaŭ disponeblos novaj kunven-salonoj ĉe **Tremplin-Dison**, en la iama konstruaĵo de «**Comedis**»). Kandidatoj jam sin konigu!



Niaj programeroj lupee

detaloj pri anoncĵaj prelegoj, vesperoj, festoj,...

La majaoj kaj ilia kalendaro



La majaoj estas indiĝena popolo de Centra Ameriko, kiu ĝuis tre gravan civilizacion inter la 3-a kaj la 10-a jarcento. Ĝi okupis grandan areon inter la nuna sudo de Meksiko, Gvatemalo, Belizo kaj okcidento de Honduro. Oni multe parolis pri ili antaŭ nelonge pro ilia fama kalendaro anoncinta la mondan finon, sed ili fakte estis bonaj kalkulantoj. Ilia sistemo baziĝis sur dudek (ne dek, kiel ni); alivorte, ĝi estas dudekuma. Dudek simboloj reprezentas la nombrojn 0 ĝis 19, kaj la pozicio de cifero reprezentas oblon de dudek. La ciferoj 1 ĝis 19 estas kutime reprezentataj per grupo de punktoj kaj linioj; punkto reprezentas 1 kaj linio estas 5.

Eble Charles **Norga** klarigos al ni la misteron de la arkeologiaj restaĵoj trovitaj en Meksiko, kiuj klare montras NIFOn aŭ sunan erupcion; aliaj eĉ neteranojn kun grandaj bluaj okuloj kiel oni povas vidi en kelkaj sciencfikciaj filmoj! Popolo ĉiaokaze malkovrenda!

04-18 20h00 BE-Kelmis, Select: "**La majaoj kaj ilia kalendaro**"

Inf. norga@senlime.org

Balingua, ĉu ankaŭ por ni ?

Kiel ni plirapidigu la instruadon de esperanto ?

En nia antaŭa numero ni prezentis la Balingua-metodon de René **Bastin** (fondinto de la lernejoj **CERAN**) por instrui lingvojn.

Ĉu **Balingua** taŭgas por instrui ankaŭ esperanton ?

Jean-Marie **Jacques** opinias ke jes kaj klopodos pruvi tion per tiu informa vespero.



La Ministro **Marcourt** lernas la ĉinan per Balingua (TéléVesdre)

Post mallonga enkonduko, la preleganto unue montras al ni kelkajn filmetojn pri **Balingua** (en la franca, sed surtekstigitajn en esperanto kompreneble) kaj poste invitos vin cheesti unuan prov-lecionon pri esperanto laŭ tiu vere aŭd-vida metodo (ankaŭ uzebla en klaso-ĉambroj kun aŭ sen komputilo).

05-16 20h00 BE-Kelmis, Select: "**Balingua, ĉu ankaŭ por ni ?**"

Inf. jacques@senlime.org

Karaoke de Senlime

Ja estas nun konate ke **Senlime** regule organizas sian propran karaoke-vesperon en Kelmis, fine de junio, agrabla maniero ĝisrevidi fine de la lerneja jaro. Kelkajn himnojn ni ankaŭ kelkfoje kantas okaze de festoj kiel la Zamenhofa en decembro, k.t.p.

Karaoke kompreneble ne havas nur ludan celon, ĝi ankaŭ havas grandan kulturalan valoron, se oni konsideras ke ĝi permesas konatigi eksterlandajn kantojn (kaj tiele kulturon) enlande... kaj inverse.

Sed eĉ plie ni povas konatigi la esperantistan kulturon kaj lingvon al neesperantistoj. Tiel karaokeo fariĝas lingvo-instruilo.

Apud la ĉi-jaraj novaĵoj, kiel «**Marina**» kaj «**Waltzing Matilda**», menciindas karaoke-versio de la mirinda kanto «**And did those feet in ancient times**» (himno «**Jerusalem**» de William BLAKE, aŭdebla fine de la filmo «**Chariots of Fire**», kiun **Senlime** krome ĵus surtekstigis).

Se vi aliĝis/os al la yahoo-grupo «**Amikejo**» vi eĉ povas senpage elŝuti el ties dosiero «Fichiers» kelkajn el la karaokeoj kreitaj aŭ adaptitaj de **Senlime**, kaj rekte uzi ilin per via komputilo.

Venu kanti (kaj ridi) kun ni : kiel kutime rajtos laŭplaĉe elekti kelkajn kantojn el nia ĉiam pli kaj pli vasta kolekto.

06-20 20h00 BE-Kelmis, Select: karaokeo de **Senlime**.

Inf. lousberg@senlime.org

ESPERANTO

Eŭregiona kalendaro 2013-2014 (2/2)



Senlime publikigas, por siaj membroj, agendon pri la esperanto-aranĝoj en la Eŭregiono Mozo-Rejno. Ĝi aperas rete kaj papere.

« Trilandaj renkontiĝoj » estas organizitaj de kiu ajn esperantisto aŭ esperanto-grupo en Eŭregiono Mozo-Rejno interkonsente kun la komitato de **Senlime**. Principe ili okazu dufoje en jaro (printempe kaj aŭtune), laŭvice en ĉiu el la tri landoj (BE, DE, NL).

Tiu-ĉi agendo eventuale povas enhavi programerojn de lokaj grupoj aŭ aktivaĵojn organizitajn aŭ subtenitajn de komitatanoj. Ĝi neniel iĝu kompleta kalendaro de esperanto-aranĝoj (aliaj ekzistas).

La Kelmis-aj kunvenoj de la grupoj de **Senlime** nun regule okazas ĉiun trian vendredon de monato en kulturcentro "Select", Lutticherstr. 264.

Por kiu ajn propono pri kunlaboro, ĉiam ege bonvena kaj atendata, bonvolu kontakti, prefere rete kaj kiel eble plej frue, la responsulon pri la kalendaro: Jean-Marie **Jacques** (jacques@senlime.org).

Pro la malbona vetero kaj la karnavalo, ni ne kunvenos en januaro kaj februaro.

03-21 20h00 BE-Kelmis,
Select: konversacia(j) tablo(j).
Inf. jacques@senlime.org

04-18 20h00 BE-Kelmis,
Select: "**La Majaoj kaj ilia kalendaro**", prelego de Charles Norga.
Inf. norga@senlime.org

05-16 20h00 BE-Kelmis,
Select: "**Balingua, ĉu ankaŭ por ni ?**", prelego de Jean-Marie **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

06-20 20h00 BE-Kelmis,
Select: karaokeo de **Senlime**
Inf. lousberg@senlime.org



Pliaj kunvenoj kaj kursoj okazos verŝajne en Kelmis (Select) ek de la 19-a de septembro, ĉiun trian vendredon de la monato je la 20a horo (informoj en nia sekvonta trimonata informilo).

Inf. jacques@senlime.org

Vu le mauvais temps et le carnaval, nous ne nous réunirons pas en janvier et février.

21-03 20h00 BE-Kelmis,
Select: table(s) de conversation
Inf. jacques@senlime.org

18-04 20h00 BE-Kelmis,
Select: "**Les Mayas et leur calendrier**", conférence de Charles Norga.
Inf. norga@senlime.org

16-05 20h00 BE-Kelmis,
Select: "**Balingua, pour nous aussi?**", conférence de Jean-Marie **Jacques**.
Inf. jacques@senlime.org

20-06 20h00 BE-Kelmis,
Select: karaoke de **Senlime**
Inf. lousberg@senlime.org



D'autres réunions et cours auront lieu vraisemblablement à La Calamine (Sélect) à partir du 19 septembre, chaque 3e vendredi du mois à 20 heures (informations dans notre prochain bulletin trimestriel).

Inf. jacques@senlime.org

Novaĵoj pri **KELMIS-AMIKEJ**

(el la ret-informilo de la Yahoo-Grupo «*Amikejo*»)

Perdialektaj bondeziroj

Oni ofte forgesas ke en Euregiono Mozo-Rejno kompreneble estas ne nur tri naciaj lingvoj sed ankaŭ multaj lokaj dialektoj. En Kelmis estas tre uzata la "plat-Deutsch" dum en Verviers estas Verviersa valon(i)a lingvo.

Okaze de la Kristnaskaj kaj novjaraj epokoj, **Senlime** deziris feliĉan jaron 2014an al ĉiuj. La tradicia "kristnaska milit-paŭzo" ĉi-foje kiel eble plej longe daŭru por vi ĉiuj!

Donacete ni invitis ĉiujn rigardi filmeton pri tipa Verviersa kristnaska kanto (originale en la Verviersa valona, sed surtekstigita ankaŭ en esperanto kaj en la franca, kaj ludita per sintezilo) ĉe

<http://www.youtube.com/watch?v=ZSIQUNlq5ok>

Facebook


Ni invitas vin malkovri la paĝon de la «**Groupe espérantiste de Verviers**» ĉe Facebook/Fesbuk (paĝo precipe franclingva sed...). Helpu nin pligrandigi nian publikon... "Like"/Ŝat-u nin!

Filmaj surtekstoj

En decembro, **Senlime** kreis surtekstojn por la neforgesenda (sed eble ne sufiĉe konata) filmo de Hugh Hudson «**Chariots of fire**» (La ĉaroj el arda fajro) – kun la escepta sonbendo de **Vangelis**.

Tiu filmo rakontas pri (parto de) la vivo de 2 britaj partoprenintoj

dum la Olimpiaj ludoj en 1924 – en epoko kiam «fair-play» en sporto kaj en vivo plu signifis ion por kelkaj veraj homoj...



En januaro, **Senlime** surtekstigis alian valoran (kaj ne sufiĉe bone taksitan de la gazetaro, kvankam ĝi estis tre bone akceptita de la publiko kaj ricevis du oskarojn) filmon : «**Ryan's Daughter**» (La filino de Rejan), de David Lean (La ponto de l'rivero Kuaj, Laŭrenco el Arabio, D-ro Ĵivago,...). Tiu filmo estas kvazaŭ vera vojaĝo en Irlando!

1916. Karray, malgranda vilaĝo lokita en la «Dingle» peninsulo, en Irlando. Sara Rejan edziniĝis al la instruisto, 15 jarojn pli aĝa ol ŝi. Senluziigita de tiu unio, ŝi enamiĝas kun angla oficiro veninta por komandi la najbaran garnizonon.

Vi povas elŭti ambaŭ surtekstarojn ĉe :

<http://www.senlime.be/Kino/Ryan.htm> kaj

<http://www.senlime.be/Kino/Chariots.htm>

Senlime tiel surtekstigis pli ol 20 filmoj kaj diversajn filmetojn. Ĉiuj tiuj surtekstoj estas videblaj kune kun kopio («divX») de la filmo – kiun vi mem akiru - per komputilo aŭ per salona legilo kapabla legi tiajn dosierojn (vidu ĝian uzmanieron).

Esperantista grupo Lieĝo

Ankaŭ la grupo de Lieĝo eklaboris pri surtekstoj! Ĉi-tie temas pri dokumenta filmo de Ges-roj Durieux pri **la pajlaj ĉapeloj de la valo de la rivero Geer**.



En tiu filmeto, oni vidas niajn gesamideanojn Nicole kaj Freddy **Close** en ilia vizitinda muzeo-domo (en Eben-Emael) dediĉita al la havo de la valo de l'Geer.

La surtekstigado de tia filmo kompreneble estas relative longa kaj malfacila pro la multnombraj teknikaj terminoj necesaj kaj – kiel ĉiam en dokumentaj filmoj – la neceso kiel eble plej simple kaj mallonge traduki lavangon da klarigaj frazoj!

Bonan laboron, Lieĝanoj!

Provizore oni povas vidi la filmeton en la franca, sen surtekstoj, ĉe http://www.dailymotion.com/video/xyuhmd_les-chapeaux-de-paille-de-la-vallee-du-geer_creation

Jean-Marie Jacques,
ĝenerala sekretario.

La Zagreba metodo

Claude PIRON: «*Gerda malaperis*»

La filmo «*Gerda malaperis*» estas produktita laŭ la samtitola libro de C. Piron, verkita por lernantoj de la internacia lingvo Esperanto (IL-o) laŭ la **Zagreba metodo** (ZM).

La ZM estas maniero instrui IL-on kaj enhavas la 500 plej uzatajn morfemojn laŭ studoj de Zlatko **Tišljar**. La ZM estis inventita en kroata ĉefurbo, kiam oni realigis multajn kursojn al diversaĝaj personoj, per diversaj metodoj kaj lernolibroj, sed la rezultoj, aparte ĉe la infanoj en lernejoj, estis nekontentigaj. Pedagogia teamo en **Internacia Kultura Servo** (IKS) en 60-aj jaroj de la 20a jarcento konstatis ke kulpas la lerniloj, kiuj ne bazas sin sur la strukturo de Esperanto mem, sed imitas lernolibrojn de aliaj naciaj lingvoj.

Z. **Tišljar** faris esploron pri ofteco de uzataj radikoj en parolata Esperanto (en UK Lucerno 1979 li surbendigis parolatan materialon de esperantistoj en ĉiutagaj konversacioj – 60.000 vortojn – kiun li komputile prilaboris) kaj ricevis la liston kun entute 1500 morfemoj el kiuj laŭ ofteco unuaj 467 kovris 95% de la tuta korpuso.

En IKS oni elektis teamon kiu faris lernolibron atentante ke ĝi ne estu granda (maksimume 12 leciona) kaj ke en ĝi enestu nur la 500 morfemoj de la menciita esploro.

Tiu baza lernolibro aperis en 30 adaptoj al diversaj - ĉefe eŭropaj lingvoj, sed ankaŭ kelkaj aziaj kaj afrikaj. Nun oni povas lerni per ĝi ankaŭ en elektronika formo ĉe **lernu.net** en 26 lingvoj.

La **Zagreba metodo** ebligas al lernantoj lerni komence sen balastaj vortoj kaj gramatikeroj nur tion kio estas nepre necesa kaj tuj praktikebla kaj tial la lernantoj pli rapide progresas ol uzante aliajn metodojn, kio altigas la lern-motivojn.

La baza Esperanto-scio akirita per tiu-ĉi metodo estas tre konvena kiel instruado minimuma, sed sufiĉa kiel antaŭscio necesa por posta lernado de alia fremdlingvo – do kiel lernendaĵo necesa kiam Esperanto servas kiel propedeŭtika rimedo.



En antaŭparolo de la libro, Piron mem prezentas la kvar ĉefajn principojn kiujn li aplikis al la instruado de esperanto per tiu libro (kiu ja estas kurso, kontraŭe al tio, kion pretendas kelkaj !):

1. Motivigi la lernanton

La ĉefa faktoro en la sukceso de lingvolernado estas motivado. Por tiun favori, la libro prezentigas kiel aventur-romano, en kiu

Jam en la dua ĉapitro atentokapta okazaĵo tiklas la scivolemon kaj instigas la lernanton legi plu.

2. Ju pli ofta la vorto, des pli frue enkonduki ĝin

La reguleco de esperanto ebligis tion fari tuj de la komenco. IKS en Zagreb havigis la necesajn laŭ-oftecajn vortlistojn, ricevitaĵojn per statistika prilaborado de konversacioj surbendigitaĵoj okaze de diversaj internaciaj kunvenoj.

3. Ripetadi en malsamaj kunteksoj

Radiko, vortero aŭ lingva strukturo asimiliĝas des pli senpene, ju pli ofte ĝi ripetiĝas, ĉefe se oni atentigas la gravecon ree prezenti ĝin en la momento kiam, ne uzate dum iu tempo-spaco, ĝi emus forgesiĝi. Tiu principo estis observata. Espereble la legantoj bonvolos pardoni la kelkfoje nenaturajn ripetojn, stile ne tre belajn, kiujn la teksto pro tio enhavas.

4. Redukti plej severe, en ĉiu instru-unuo, la proporciojn de novaj lernendaĵoj.

Tiel, ĉiu nove enkondukata elemento estas kvazaŭ portata de la tuta kunteksto. En ĉi tiu libro, novaj vortoj aperas tiamaniere, ke, asimilinte la enhavon de la unua ĉapitr(et)o, la lernanto jam komprenas almenaŭ 82 procentojn de ĉapitroj 2 ĝis 8; 89 procentojn de ĉapitroj 9 ĝis 12; kaj 92 procentojn de la tekstoj post ĉapitro 12. Fakte, la lasta ĉapitro enhavas nur 3 procentojn da novaj radikoj.

Tiun romaneton eldonis **FONTO**

Verviersa **A**ngulo

Verviersa **E**speranto **G**ruppo

Cours et Congrès

Universel 2015 (Lille)

Comité de V.E.G.

Président: J. Jacob
19 Chemin de la Rostibouhaye
4910 POLLEUR (THEUX)
Tél. 087/22.10.79

Trésorier: D. Lousberg
25 Rue Pierre Fluche
4800 VERVIERS
Tél. 087/22.20.30

Secrétaire: J.M. Jacques
5 Rue Joseph Wauters
4800 VERVIERS
Tél. 087/33.02.92

Association pour l'Espéranto (A.P.E.)
Secrétaire : Claude GLADY
Rue du Culot, 1
5630 CERFONTAINE
Tél. 071 644 916 cglady@arcadis.be

Cotisations

Les espérantistes et sympathisants sont cordialement invités à soutenir notre programme d'action en versant chaque année leur(s) cotisation(s) au compte :

IBAN : **BE41 9795 3271 4810**
BIC : ARSPBE22
(banque : Argenta)

de **Senlime**, 25 rue Pierre Fluche,
4800 VERVIERS, Belgio.

Ce bulletin d'information est également intégré à la revue de A.P.E. («Espéranto en marche») dans laquelle vous trouverez les montants des abonnements et cotisations à APE et/ou UEA.

La cotisation pour Senlime reste fixée à 10 Euros (mais les dons sont également bienvenus).

Indiquez les nom, prénom et domicile du membre cotisant ainsi que le motif du paiement:
«cotisation de.... pour....».

D'avance, merci à tous !

Lille, capitale du département Nord et de la région Nord-Pas-de-Calais (région de **Boulogne-sur-Mer**), située au cœur de l'Eurorégio «Kent – Nord France – Belgique », accueillera le 100^e Congrès Universel d'Espéranto du 25 juillet au 1^{er} août 2015.

En souvenir du 1^{er} Congrès qui eut lieu à **Boulogne-sur-Mer** (en présence de L. **Zamenhof** lui-même), une journée d'excursion se déroulera dans cette ville (dont l'infrastructure n'est plus suffisante pour y organiser un grand congrès).



L'événement aura donc lieu à «**Lille Grand Palais**», qui peut recevoir jusqu'à 5000 participants et est situé dans le quartier d'affaires **Euralille**, à seulement quelques minutes à pied de la gare et du centre-ville.

Lille est à moins de 1 heure de Paris, à 35 minutes de Bruxelles et 80 minutes de Londres, 3 heures seulement de Verviers (235 km), mais pas de barrières administratives ou linguistiques pour y arriver! Voici donc une occasion unique pour tester et augmenter ses connaissances en espéranto, à la rencontre d'espérantistes de tous les pays du monde.

Lille possède un patrimoine très diversifié, du fait des nombreux conflits qui l'ont touché et ont amené des reconstructions partielles de la ville.

De nombreuses activités intéressantes (en espéranto évidemment) sont programmées chaque année lors du Congrès Universel : ouverture solennelle (toujours très émouvante), banquet, bal, concerts, soirée internationale, conférences, présentation de livres, réunions de groupes spécialisés, **cours** d'espéranto (pour **débutants** mais aussi, bien entendu, de **perfectionnement**) et divers cours (dont certains de niveau universitaire), théâtre, cinéma, excursions et visites,...

A cette occasion (il faut attendre pas mal d'années pour qu'un congrès universel se déroule à proximité), le groupe espérantiste de Verviers donnera de nouveaux **cours** d'espéranto pendant l'année scolaire 2014-2015 afin de permettre (et non imposer, bien entendu) aux participants de saisir cette occasion de rencontrer des espérantistes du monde entier et, par la même occasion, tester leurs connaissances et les améliorer.

Nos cours sont très précisément conçus selon la méthode dite de **Zagreb**, préconisant l'étude des éléments du vocabulaire par ordre de fréquence d'utilisation (les mots les plus utilisés sont étudiés en premier lieu). Il existe des listes de fréquences dans toutes les langues mais pour l'espéranto, ces listes ont été établies sur base d'enregistrements de conversations pendant un... congrès universel!

Pré-inscriptions et renseignements chez **J.-M. Jacques**.